# Jura Semajno

**Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio**

**Septembro: 2 2025**

## EKS-PREZIDENTO JAIR BOLSONARO KONDAMNITA DE LA SUPERA BRAZILA KORTUMO



Pasint-semajne, la unua ĉambro de la Supera Kortumo de Brazilo kondamnis, per 4 voĉoj kontraŭ 1, eksan prezidenton Jair Bolsonaro, pro la delikto organizi puĉon post la balotadoj de la jaro 2022, tiam venkis la nuna prezidento Lula da Silva. Krom ĉi tiu delikto, li ankaŭ estas kondamnita pro sia intenco nuligi perforte la demokratian reĝimon en Brazilo. Entute la Supera Kortumo kondamnis lin je 27 jaroj kaj 3 monatoj de malliberigo.

Dum la jura proceso, la ĝenerala prokuroro de la Respubliko asertis, ke Bolsonaro estris grupon. Tie aniĝis elstaruloj de la antaŭa registaro, la armeo kaj la inform-kolekta agentejo, kiuj ellaboris kaj penis efektivigi agad-planon por ataki la naciajn demokratiajn instituciojn. Laŭ la ĵus diskonigita juĝo, Bolsonaro troviĝis ĉe la pinto de tiu puĉa komploto, kiu celis nuligi la venkon de la nuntempa prezidento Lula da Silva kaj tiel, atingi la povon je kiu ajn kosto.

Tamen, la juĝo ĉe la Supera Kortumo ne estis unuanima. Unu el la juĝistoj, Luiz Fux, opiniis, ke ne ekzistas sufiĉe pravigaj argumentoj por kondamni la eks-prezidenton. Laŭ li, oni ne povas puni iun, kiu nur pripensis la eblon efektivigi puĉon, se fine tio ne estas plenumita per

konkretaj agoj, kiel aprobo de dekreto nuliganta la demokratiajn institucioj aŭ de arbitra sieĝo-stato celanta la nuligon de politikaj garantioj. Laŭ la juĝisto Fox, efektive Bolsonaro komentis kaj debatis kun aliaj homoj aprobi tiajn dekretojn, tamen fine nenio realiĝis.

Ĉi tiu jura opinio ricevis kritikojn. Se tiel, ĉu neniu povus esti kondamnita pro murdo, eĉ se almenaŭ sen-sukcesa, se fine la viktimo ne mortis? Do, kiu ajn intenco nuligi demokration ne povus esti kondamnita se fine puĉo ne sukcesas. Evidente neniu jura proceso kun la celo kondamni tiun agon okazus, se fine puĉo sukcesas.

Verdire, ĉi tiu jura proceso dividis la tutan landon. Laŭ ĵurnaloj, apogantoj kaj rifuzantoj de la agad-plano de Bolsonaro egalas 50%-50%. Same, duono el brazilanoj opinias, ke li estas kulpa, kaj la cetera duono asertas, ke ĉi ĉio estis aranĝo celanta malebligi la partoprenon de Bolsonaro en la venontaj balotadoj, okazontaj en oktobro 2026.

# *Vorto de la Semajno*



**DECIDI**:

1. Post pripenso, definitive fiksi, kio devas esti farata.
2. Meti finon al demando, diskuto aŭ proceso, venkigante unu el la partioj.

*Sinonimo: Juĝi.*

*Ekzemplo: En tiu proceso juĝisto devas decidi inter libero kaj enkarcerigo.*

# *Kiel traduki ...?*

Jeremiah, membro de IJEA en Usono, demandas pri eblaj tradukoj de jenaj anglalingvaj vortoj:

• **Extraordinary rendition.** Temas pri malaperigo de homo fare de ŝtato. Sur la esperanta versio de *Le Monde Diplomatique* aperis "Sekreta forkonduko". Ankaŭ estas proponata "Malaperiga forkonduko".

• **Black site.** Tiu loko kien iu estas sendita aŭ enkarcerigita sekrete. Ĉu "sekreta malliberejo"?

• **Extrajudicial killing.** Murdo de homo ordonita de ŝtato post nenia jura proceso. La esperanta versio de *Le Monde Diplomatique* uzis "Eksterjustican ekzekuton". Ĉu eblas ankaŭ "Eksterjustica mortigo"?

• **Targeted killing.** Temas pri eksterjustica ekzekuto antaŭdecidita de ŝtato. Ĉu "selektiva ekzekuto" aŭ "Alcela eksterjustica ekzekuto"?

Opinioj estas ege bonvenaj. Ili aperos sur la venonta numero de la bulteno.

## *Ĉu vi ankoraŭ ne ricevis la lastan numeron de Jura Tribuno Internacia?*

Kadre de la pasinta Universala Kongreso de Esperanto en Brno, IJEA aperigis la numeron 23an de sia oficiala revuo *"Jura Tribuno Internacia"*. Ĝi estas sendita al membroj de la asocio. Se vi ankoraŭ ne ricevis ĝin, bv. kontakti kun la asocio. Dankon!


JURA
TRIBUNO
INTERNACIA
§

N-ro 23
Jaro 2024
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

**jurista@esperanto.ac**

**Internacia Jurista Esperanto-Asocio * www.esperantojuro.org**